Zhāng Jiŭ Líng,

La akvofalo

tradukita de Xiong Linping

De alto de dek-mil futoj,
kvazaŭ de la ĉielo
la kaskado fluge ĵetas sin suben,
kaj ĉirkaŭ ĝi prezentiĝas
nimbo jen ruĝa jen purpura.
Ĝi, ŝajnante esti ĉielarko sub la suno,
rekte falas inter arboj kaj tra la nebulo;
en la serena vetero aŭdeblas
bruo de vento kaj pluvo.
Kiel majestas la monto Lushan!
La nebulo kaj la akvo harmonie
kunfandiĝas en fean iluminacion.

Traduko de la ĉina poemo "Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ" de Zhāng Jiŭ Líng en Esperanton de Xiong Linping.

Arg-987-1991 (2014-04-03 10:44:09)

Zhāng Jiŭ Líng,

Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ

Wàn zhàng hóng quán luò
tiáo tiáo bàn zǐ fēn
bēn liú xià zá shù
sǎ luò chū chóng yún
rì zhào hóng ní sì
tiān qīng fēng yǔ wén
líng shān duō xiù sè
kōng shuǐ gòng yīn yūn

Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas Zhāng Jiŭ Líng.

Arg-987-1990 (2014-04-04 19:34:22)

Pri la poeto vidu la retejon `http://ja.wikipedia.org/wiki/eëχ∂є₣ŭ„ђ` *respektive* `http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Jiuling`*. La titolo signifas: "De Hukou mi rigardas la akvofalon de la monto Lushan".*